La venonta festo diferencos de la antaŭa en tio, ke la konkursoj estos pli multaj, kaj ke ili ne estos limigitaj al la grupoj de ĉi tiu federacio. Oni invitas la federaciojn de Yorkshire kaj la Mezlando partopreni en ĉiuj konkursoj, kaj ĉiu literatura konkursa, desegna, stenografia kaj parolad-konkursoj estos malfermitaj por ĉiu esperantisto loganta ie en la Brita Insularo. Tio per si mem pligravigos la feston kaj espereble helpos al ĝia plena sukceso.

Ĉiu el la premioj de la 4 ĉefaj originalaj literaturajoj ricevos esperantajon, kiu egalvaloras 5 spesmilojn, kaj la aŭtoro de la plej bona el tiuj premiitaj verkoj ricevos la oran medalon donacitan de la Prezidanto de la Federacio, aljugotan de la konata Esperantisto, S-ro Edmond Privat. Tiu estos ankaŭ kronata la laŭreato de la festo. La premioj por la 11 ceteraj konkursoj varias de 2½ ĝis 5 spesmiloj.

Entreprenante denove konkuran feston, la federacia komitato rekomendas ĝin kiel bonan propagandilon por nia afero kaj kiel taŭgan instigilon laŭ lingva, literatura kaj muzika vidpunktoj. Ni petas, ke la samideanoj partoprenu grandanombre en la konkursoj, por ke la venonta festo bone atingu sian celon.

Oni bonvolu sin turni al la Sekretario por tabelo de la diversaj konkursoj, generalaj kondiĉoj kaj la vortoj de la deklamo kaj de la soprana, kontralda, tenora, baritona kaj duvoĉa kantoj. Prezo de tabelo 2 pencej (aŭ dekduo por 1s.9d.) afrankite.

Mondonacojn grandajn aŭ malgrandajn danke akceptos la sekretario.

Sincere viaj,

RHODES MARRIOTT, Prezidanto.

G. RHYS GRIFFITHS, Hon. Sekretario.

12 Bennison-drive, Grassendale, Liverpool.

Programoj, entenantaj plenajn detalojn pri la diversaj konkursoj, generalaj kondiĉojn, la vortojn de la deklamo kaj la vortojn de la konkraj kantoj estas aĉetebaj ĉe la Sekretario por 2 pencej aŭ dekduo por 1/9 (afrankite).

* * *

Alvoko.—Geologiistoj, botanikistoj kaj zoologiistoj, kiuj samopinias, ke esplori la naturon de difinita loko laŭ diversaj vidpunktoj, estas necesa preparo por moderna populara sintezo de scienco, trovas dum libertempo en la bela altmontara regiono de Davos, modestan laborejon, iom da literaturo, kaj fervoran kunlaboranton. Laŭbezone ĉio en Esperanto. Informoj de D-ro W. Marchand, *Luginsland Davos-Dorf, Svisujo.*

* * *

TO FORM NEW GROUPS.

Mr. O. Godman, of St. Albans, has suggested that the names and addresses of Esperantists, living in towns where there is as yet no group, should be printed in the B.E. with a view to a group being established. The suggestion seems to us a good one, as Esperantists in towns without a group centre are often unaware of each other's existence; and we should therefore be obliged if all who are willing that their names and addresses should be published for this purpose would kindly send us a postcard with the particulars.—
ED., B.E.

Ekzamenoj de la Internacia Instituto de Esperanto ĉe la Kongreso en Bern.

Kandidatoj antaŭsciigu la Instituton, 10 rue de la Bourse, Genève.

Programo II. Atesto pri kapableco.

Estas postulate, ke la kandidato bone konu la gramatikon, vortaron kaj sintakson, povu flue kaj korekte paroli la lingvon kaj sciu pri la historio kaj generala organizo de Esperantismo.

A. *Skriba ekzameno.* 1e, Letero unupaĝa pri donita temo el ĉiutaga vivo; 2e, unupaĝa rakonto pri esperantista temo (historia, organiza aŭ praktika). B.

Parola ekzameno. 1e, Momenta interparolado esperante pri generalaj aferoj; 2e, komentario pri du teksto donitaj; 3e, respondo al esperantaj demandoj pri gramatiko. La enskribo kostas 5 Sm.

Programo III. Profesora Diplomo.

Estas postulate, ke la kandidato plene konu la gramatikon, sintakson kaj vortaron de la lingvo, plene konu nian literaturon (Verkaron de D-ro Zamenhof, k.t.p.) pruvu sian studadon de la historio kaj organizoj de esperantismo (Kongresoj, Akademio, Universala Esperanto-Asocio, Internacia monsistemo, Interna Ideo, Paroladoj de D-ro Zamenhof, k.t.p.), konu la diversajn metodojn de esperanta instruado (parola metodo, senpera metodo, instruo por la infanoj, k.t.p.). Li devas nepre flue kaj korekte paroli, por ke li povu en Esperanto taŭge komentari ian donitan tekston, bone klarigi stilan aŭ gramatikan demandon, k.t.p.

A. *Skriba ekzameno.* 1e, Skribverkajo pri esperantista temo; 2e, skribverkajo pri instrua, lingva aŭ literatura temo (almenaŭ 1,000 vortoj). B. *Parola ekzameno:* 1e, lego kaj klarigo pri donita teksto; 2e, respondo al gramatikaj demandoj (esperante); 3e, interparolado pri la maniere instrui esp.; 4e, leciono en esp.; modela klarigo pri gramatika aŭ stila demando; 5e, respondo al demandoj pri Historio kaj organizoj de esp. vivo de la lingvo. k.t.p. Enskribo Sm. 10.



Some Singular Plurals.

We'll begin with a box, and the plural is boxes,
But the plural of ox should be oxen, not oxes.
Then one fowl is goose, but two are called geese,
Yet the plural of moose should never be meese.

You may find a lone mouse or a whole lot of mice,
But the plural of house is houses, not hice.
If the plural of man is always called men,
Why shouldn't the plural of pan be called pen?

Then cow in the plural may be cows or kine,
But a bow if repeated is never called bine,
While the plural of vow is vows and not vine.
If I speak of a foot and you show me your feet,
And I give you a boot, would a pair be called beet?
If one is a tooth and the whole set are teeth,
Why shouldn't the plural of booth be called beeth?

Then one may be that and three would be those,
Yet hat in the plural should never be hose!
And the plural of rat is rats and not rose.

We speak of a brother and also of brethren,
But though we say mother, we never say methren.

Then the masculine pronouns are he, his and him,
But imagine the feminine she, shis and shim.

So the English, I think, you all will agree
Is the most wonderful language you ever did see.

(ANONYMOUS).

Precipe pro Akcidento kaj la Kompato de la Naturo...

Originale verkita de ARTHUR GRAY.

[Anglaĵo de tiu ĉi rakonteto jam publikigis en la *Red Magazine*.]

* * *

*Kiam el lia visaĝo la varma sango forfluis;
Kiam la voĉo lia ektremis en vort' komencita,
Al la okuloj lasante la taskon esprimi parolon,
Kiun subita pasio eksilentigis en gorgo;
Kiam la karaj okuloj, brilante per flamo
Neniam mortonta,
Brulis la miajn, ne estis al li ke ekvenis la amo—
Al la ne, sed al mi!*

*El la franca de
MARCELINE DESBORDES-VALMORE.*

* * *

Si sidis en la posta parto de la boateto, gvidante ĝin tra la aŭtuna vespero, kvazaŭ ŝi celus la kušigantan sunon, preter la amasiĝintaj verdo kaj oro de la ĝardenoj; kaj ŝiaj dolĉaj okuloj fariĝis ankoraŭ pli dolĉaj sub la ĉarmo de la pacego de tiu mortanta tago. Si estis bela, laŭ la beleco de granda animo revanta en ŝiaj okuloj, ŝiaj blankaj manoj, facile okupataj per la gvidado de la boateto, atestis elokvente pri la kulturiteco kaj ĝentileco de ŝia vivo, kaj la rondeco de ŝiaj nudaj brakoj donis allogan promeson pri fizika perfekteco. Kaj tamen la okuloj de la viro, kiu remis la boaton, rigardis preter ŝi en la malplenon post ŝia dorso. Nur tiam, kiam ŝi disreviĝis el la ĉarmo de la silentado, kaj ekparolis, liaj okuloj sekvis la vocon, kaj kun stranga necerteco serĉis la ŝiajn.

"Malforte remu! Ni ligu la boaton kontraŭ la bordo, kaj babilu." Per lerteco akirita de longa ekzercado, ŝi surpaſis la teron, kiam la boato ektuſis ĝin, kaj, gvidante liajn ŝanceligantajn piedojn, kondukis lin post si sur teron.

Li ne estadis blinda ĉiam. Antaŭ dek monatoj, la cerba febro, kiun li suferis post severa fallo de sur ia ĉevalo, lasis lin sana kaj sendifikta spirite kaj korpe, sed blinda. Nekompreneblaĵo okazis. Oni ja pensis, ke li forlasos ia malsanulan ĉambron kriplulo; kaj tamen liaj dorso kaj membroj estis rektaj kaj sanaj, kaj ja estis plezuro vidi lian fortikecon.

Tiel pensis la virino, kiu sidis sur la herbo, lin rigardante; kaj ŝiaj okuloj doligis denove, dum ŝi rigardadis — doligis pro sento pli profunda ol tiu, kiu eniras la okulojn de ĉiu vera virino pro rigardo de difekto ĉe forta viro. Tiu ĉi loko estis senhoma kaj tre silentata, kun silentado rompata nur de la raŭka voko de la pavo al la proksimiganta nokto. Tial ŝi apogis la mentonon sur la manoj, kaj — ĉar li ne povas legi ŝian sekreteton — lasis la amon en siaj okuloj

elbrili libere. Kial ne? Li scias jam — nepre li scias jam!

La situacio ja estas absurdaj, ŝi diris al si, la centan fojon de la tempo, kiam eknaskigis tiu stranga ĝojo en ŝia koro. Si ja konis la nevenkeblan fierecon, kiu sigelis liajn lipojn, dum la karaj okuloj ne kapablis paroli. Sed ĉu tiu fiereco ja estas nevenkebla? Se ŝi provus ĝin venki? Si klinis sin al li, subite decidinte, kontenta, ke li ne povas vidi ŝian vizaĝon.

"Johano! Ĉu vi rememoras la versajon, kiun mi legis al vi hodiaŭ matene?"

"Ĉu:

'Kiam la voĉo ektremis...'

Kiel ĝi daŭrigas?...

'Lasante al liaj okuloj...'"

Liaj lipoj kunpremiĝis pro subita doloro.

"Jes." Ŝi mem tremetis, sciante, ke ŝi nepre dolorigos lin. Sed ŝi daŭrigis, kurage:

"Kiam la voĉo lia ektremis en vort' komencita,

Al la okuloj lasante la taskon esprimi parolon

Kiun subita pasio eksilentigis en gorgo..."

Ho, Johano, viaj okuloj ne povas esprimi tiun parolon, kaj vi metis sigelon sur viajn lipojn. Kial — kial vi estas tiel malsaga? Kial, estante — estante blinda, vi restas ankaŭ muta?"

Denove lia bušo kunpremiĝis pro doloro.

"Pardonu min! Ho, Johano, ĉu vi neniam komprenos?"

Li kovris la vizaĝon. Ŝi vidis, ke liaj manoj tremas, kaj konsoligis iom. Dum terura momento, ŝi preskaŭ timis, ke ŝi trompis sin. Dum kvin senfinaj minutoj, la pavo kriadiis triumfe al nerompata silentado; kaj kiam, fine, li reparolis, lia voĉo estis strange maldolĉa.

"Ĉu vi penas, ke mi trovis mian bataladon tiel facila, ke — ke — vi volas min tenti denove? Pro kompato nur, ne parolu plu pri tio!"

Li leviĝis, kaj liaj fingroj baraktis konvulsie.

"Ni iru returne!" Li ekiris al la boato, ligita al la bordo de la rivero.

"Johano, atentu!"

Li aŭdis la avertion tro malfrue. Li jam faris unu blindan paſon tro, kaj kiam li falis, lia kapo frapiĝis kontraŭ la gvidilo de la boato. Ŝi jetis sin en la akvon preskaŭ samtempe. Sed la frapo senkonsciigis lin; kaj la senviva pezo de lia bela vireco estis preskaŭ tro granda por ŝiaj fortoj. Kiam fine alvenis helpantoj el la proksima ĝardeno, ŝi jam ne povis plu. Li estis ankoraŭ senkonscia, kiam oni kušigis lian korpon, tiel strange senmovan, sur la herbon; kaj ŝia timo pruntis al ŝi forton sufican por frotadi liajn malvarmajn membrojn dum ŝajna eterno. La granda, ruĝa suno formortis malrapide en gloro el bluo kaj verdo kaj oro; kaj ŝia koro mortiĝis en ŝi, kiam ŝi ekrigardis la brillantan okcidenton. Ĉu tio ĉi do estos la fino?

La viro respiris, subite, kvazaŭ ekplorante, kaj malfermis la okulojn. Li refermis ilin tuj,

kun malforta krio de doloro. Si prenis liajn manojn en la siajn, sed ne provis paroli. Li malfermis la okulojn denove en la profundiganta krepusko, kaj pasigis la manojn antaŭ ili, kvazaŭ por ilin ŝirmi kontraŭ la lumo.

"Heleno!" Lia voĉo estis kompatinda murmuro; kaj li serĉis ŝian manon blinde, kiel infaneto. "Heleno — miaj okuloj..."

Si metis la manon facile sur lian frunton, kaj sekve, kiam spasmo de doloro transkuris lian vizaĝon, imitis lian propran geston, kaj ŝirmis liajn okulojn.

"Heleno," li murmuris denove, "gi dolorigas miajn okulojn. Ne forprenu forprenu vian manon. Miaj okuloj..." Li ĉesis kun ĝemo.

Fojon denove, dum tuta momento, ŝia koro ekĉesis batadon pro nova, tute freneza espero. Si jam aŭdis pri tiaj kazoj de subita resaniĝo — unu el miliono. Sed ŝi respondis, dolĉe kiel patrino :

"Ne timu, kara; ne timu. Vi falis en la akvon; kaj via kapo vundetigis, kaj nun oni tuj vin portos en fiakron."

"Jes, jes; sed — forprenu vian manon, momento. Heleno, miaj okuloj!"

Lia voĉo restis Mizere malforta; sed nun gi elsonis per nova noto, noto ĝoja, esperoplena. Li malfermis la okulojn denove, kiam ŝi forprenis sian manon. Ĉi tiun fojon, en la kompatema ombro de la kreskanta krepusko, ili restis malfermataj, kaj — serĉis kaj trovis siajn.

Tiam si sciis certe, ke plenumiĝis la miraklo, kiun ŝi ne kuraĝis eĉ ekesperi; kaj ŝi klinis sin malsupren por kisi liajn pezajn palpebrojn.

"Fermu ilin zorge, karega; kaj promesu al mi, ke vi ne remalfermos ilin, antaŭ ol la lumo tute malaperos."

* * *

Kiam, fine, ili troviĝis en la flakro, veturante al lia loĝejo, li malobeis al ŝia ordono, kaj rigardis en siajn okulojn.

"Tute malgrave," li respondis, kiam ŝi protestis. "Ili ja kapablas esprimi tiun parolon, nun!"

* * * *

Dum Malluma Nokto.

(*Fragmentoj el la Vivo*).

Jam vesperiĝis. Kruela norda vento blovis kun forta brujo. En la kavaĵoj de pavimo kaj trotuaro vidigis malgrandaj pluvlagetoj, kiuj ondetigadis de la ventblovo. La arboj surde bruis per siaj supraĵoj. Ie brileatis lanternoj. La mallumo iom post iom densiĝis. Preskaŭ neniu oni povis vidi irantan.

Apud unu domo en la niĉo io nigrigis. Alveninte pli proksime, oni povus vidi, ke tie staras junia knabo, kiu, ŝajnas, havis ne pli ol dek ses jarojn. Li estis ĉifone vestita kaj frostetremis.

Kia okazo igis lin stari ĉi tie? Ĉu li ne havas pli oportunan rifugejon, kaj kial li ne iris hejmen?

Jes, li nenion havas. Li estas malriĉulo, preskaŭ almozulo. Dekdujaran knabon oni lin alveturigis en la urbon, instalis lin al botisto por ellerni lian metion. Sed malfacilaj cirkonstancoj tute mortigis ĉian deziron lernadi tiun artajon. Li ne povis plue toleri la batadon de l' mastro kaj de liaj submastroj kaj li forkuris. Ne trovinte por si suficien laboron, li konatiĝis kun samspecaj senhejmuloj kaj trafis sur strato. Li komencis peti de la preterirantoj almozon. Sed preskaŭ neniu donis al li; kontraŭe ili konsilis al li serĉi laboron. Kiam estis somero, li ne tiel forte sentis sian senhejmecon, sed kiam komenciĝis la aŭtuno kaj kune kun gi la malvarmo, li jam ne sciis kion fari. Li kelkfoje trafis policejon, sed tie, ne trovinte je li ion kulpan, oni forlasis lin, kaj li denove iris straton. Multe da noktoj li pasigis sur strato.

Kaj nun, kiam ni vidas lin, li trovis noktrifugejon en niĉo de iu domo. La muroj de la neprofunda niĉo iom ŝirmis lin kontraŭ la kruela ventego. Hodiaŭ li malsukcessis en siaj almozpetoj kaj, pro tio, li estis malsata. Subite li ektremis. Li aŭdis pašojn. Espero ekbrilis en liaj okuloj. Eble tiu pasanto estos pli bonkora kaj ne rifuzos al li la peton. Eĉ se nur monon suficien por unu funto da pano li donus al li, li estus feliĉa.

La pašoj alproksimiĝis. En la malgranda rondo de la lumo, kiun jetis de si la lanterno, ekaperis homo. Li iris kun pensoplena vizaĝo. Alpaŝinte al la lanterno, li haltis, kaj, iom pri-pensante, li elpoŝigis libreton, ion legis kaj, enpoŝiginte ĝin, elpoŝigis paperujon. En la unua momento la almozulo volis aliri al li, sed io lin haltigis. Li observis lin el sia rifugejo. La pasanto eltiris el la paperujo papermonojn kaj komencis ilin kalkuli. La ruĝaj kaj verdaj rondoj ekbrileatis antaŭ la okuloj de la knabo. Subita penso trapikis lin. Gi ĉirkaŭbruligis lian carbon. La manoj senkoncie palpis ion. Unu forta salto kaj — peza ŝtono surde ion frapis. La pasanto raŭke ekkriis kaj falis sur la pavimon. Neniu apudestis, nur unu lanterno estis atestanto de la akcidento.

La timigita knabo fariĝis kiel konsternita, sed ekmemorinte, ke li hodiaŭ ankoraŭ ne mangis, li kaptis el la manoj de l' falinto la monon kaj kuris for. La ventego, ŝajnas, blovegis pli forte. Gi fajfis inter metalfadenoj de telegrafokolonoj kaj domoj, sed li kuris kaj kuris. Jen jam estas la urblimo kaj li, ne povante sin haltigi, kuris pluen, kvazaŭ iu lin persekutis. La ventego deſiris de lia kapo la ĉapon kaj nun ŝiris liajn senkovrajn harojn. Preterkurinte la urblimon, li enkuris arbaron. Ĉi tie li haltis. La malklara konscio revenis al li kaj li, terurita de tio, kion li faris, denove

fariĝis kiel freneza. Kun tremantaj manoj kaj largaj okuloj li sin jetis en profundajon de arbaro. Alproksimiĝinte al dika pino, li rapide malligis sian zonon, kaj alfiksis ĝin al kurba branĉo de l' pino, kaj faris mašon...

La densa arbaro severe bruegis, kaj la ventego en freneza danco pelis la nigrain nubojn kaj balancis la pendigitan korpon, ludante per ĝui haroj...

Originale verkis JOHANO KAMOLIKOV.

Lingva Komitato.

PRI LA VORTFARADO.

(El "Oficiala Gazeto").

En la numero 50 de *Oficiala Gazeto*, ni publikigis la raporton de la Komisio pri vortfarado, kun teksto, kiun la Akademio akceptis, lanpropono de tiu Komisio. Tiun tekston ni submetis al la aprobo de la Lingva Komitato, laŭ regulo 22 de nia Regularo.

Car tri monatojn post ĝia publikigo, ĝi neestas malakceptita de unu triono de la Komitato, ĝi fariĝas oficiala, kaj ni petas la esperantistajn gazetojn ĝin represi.

Jen tiu teksto, jam publikigita en la numero 50 de *Oficiala Gazeto*:

1. *La Akademio opinias, ke la vortfarado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto, kaj ne sur tiel nomitaj "reguloj de derivado"; ke reguloj de derivado malutilus al la lingvo, agante kontraŭ ĝia normala funkciado, ke tiaj reguloj alportus arbitrajn elementojn, genantajn por la skribata lingvo kaj malutilajn por la parolata lingvo.*

2. *La Akademio opinias, ke kelkaj aŭtoroj trouzas sufiksojn: tio estas preskaŭ neevitebla en la parolata lingvo, sed tio estigas la skribatan lingvon nenecese peza. La kaŭzo de tiu trouzo kuſas en la fakto, ke nevole oni ofte tro insistas sur ĉiu esprimota ideo por ĝin penetrigi pli forte en spiriton de l' aŭskultanto aŭ de l' leganto. Car aliflanke, oni ne devas tiom ŝparegi la sufiksojn, ke la vortoj fariĝas nekompreneblaj, estas konsilinde difini la limojn, inter kiuj oni devas resti, tiamaniere ke oni lasos al arbitro kaj al personaj preferoj rolon kiel eble plej malgrandan.*

La Akademio do rekondendas al la esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

(a). *Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentantan de tiu vorto;*

(b). *Principo de sufico: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzable komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti eljetata kiel neutila kaj nenecesa.*

El la Historio de Lingvo Internacia.*

Lingvo Internacia, la plej malnova el niaj esperantaj gazetoj, estis fondita en Decembro, 1895, de la Esperantista Klubo ĉe la Universitato Uppsala en Svedujo. Ĝia programo, tuj de la komenco, estis necedema fideleco al la lingvo de D-ro Zamenhof, kiun ĝi konsideris kiel vivanta lingvo, uzebla jam kaj uzota. Dum kvar jaroj, ĝis la fino de 1899, — en kiu lasta jaro P. Nylén, la nuna Akademiano, fariĝis ĉefredaktoro — ĝi publikigis plej diversajn artikolojn ĉu originalajn ĉu tradukitajn en lingvo kiel eble plej pura, bela, klasika. Inter la kunlaborantoj de tiu ĉi sveda periodo ni trovas la nomojn de D-ro Zamenhof, Nylén, Langlet, Kofman, Gernet, Kazi-Girej, de Beaufront, Devyatnin, Chavet, Ĉehov, Vejtcler, Zeidlitz, Evstife'ief, Grabowski, Amiko, k.t.p. Malgraŭ la neordinara talento de tiu redaktisto, la financa situacio, pro manko de abonantoj, ne estis brila kaj post vana alvoko en 1899 por akiri almenaŭ entute 500 abonantojn, — nur 216 oni estis trovinta, — S-ro Nylén akceptis kun danko kaj ĝojo la solvon, kiom alportis al li S-ro Paŭlo de Lengyel, modesta, malriĉa hungara presisto en Szegzár. Tiu ĉi kun granda sindono kaj sinforgesemo, "car la ĉeso de la gazeto eble alportus dangeron por la afero Esperanta," prenis sur sin la presadon kaj dissendadon de *Lingvo Internacia* kaj tiamaniere ĝin savis de neduba perdo. Dum 1900 kaj ĝis Aŭgusto, 1901, P. Nylén restis tamen ĉefredaktoro, sed tiam, pro troa okupateco, li fordonis la ĉefan redaktadon al Paolo de Lengyel, kiu sola estris la gazeton ĝis la fino de l' jaro. En Januaro, 1902, S-ro P. Fruictier el Parizo fariĝis ĉefredaktoro, sed la administracio kaj presado restis en Szegzár. La ĉefaj kunlaborantoj de tiu ĉi hungara periodo estas: D-ro Zamenhof, Ahlberg, Nylén, de Lengyel, Kofman, de Beaufront, de Makay, Dombovski, Radvan-Rypinski, Sig. Agrell, Ebner Fruictier, Lallemand, Bean, Bourlet, Cart, Rakitski, k.t.p., ĉiuj nomoj amataj de la legantoj, kiuj ŝatas precipe la purecon kaj severan klasikecon de l' stilo.

En aŭtuno 1904, S-ro de Lengyel kun sia presmaterialo kaj *Lingvo Internacia* translokigis Parizon. Ĝis la fino de 1906 S-ro Fruictier direktis la gazeton kaj de 1907 direktis ĝin S-ro Cart. § Al la malnovaj kunlaborantoj aldonigas S-roj Corret, Era, D-ro Noel, Ned Kathryn, F-ino Shafer, F-ino Sidlovskaja, D-ro

* Niaj abonantoj legos kun interesoj la jenajn informojn: el la vivo de nia Kolego L.I., kiun ĉiu Esperantisto devus persone koni kaj kongi al aliaj. — R.R.E.

† Relative li jam estis preninta sur sin la redaktadon de la gazeto en aŭtuno, 1897.

‡ Nomo Akademiano.

§ S-ro Mann estis dum kelka tempo sekretario.

Vallienne, Sam. Meyer, C. E. Bicknell, J. Ellis, H. Clegg, S-ino Hankel, B. Kotzin, Lojko, Mann, Stroele, A. Pride, k.t.p. Tiu ĉi periodo estas precipa signifa de grava batalo kontraŭ ĉiuj ajn pli malpli kaŝitaj reformistoj. Firme staras *Lingvo Internacia* ĉe sia devizo: "Ni restos fidelaj kaj fosas nian sulkon!"

FIDULO.



Redakcia Korespondado.

In connection with the letter published on page 115 of our June number, suggesting the organisation of Esperanto meetings at seaside resorts, our President has made the practical proposition that any Esperantist staying for the holidays in such places, who is desirous of getting or giving Esperanto conversational practice, should make it a habit to be at the chief pier entrance on Monday mornings, say at 10 o'clock. *Libertempuloj volu tion al si noti!*

Meanwhile the following have sent in their names as willing to co-operate in the manner suggested:—Mr. Surtees Corne, Musical Director, The Pier, SKEGNESS (on pier practically all day throughout season, July 6 to end of September—Leicester and Nottingham samideanoj might make excursion); William Bailey, Bassoon Player in the LLANDUDNO Pier Co.'s Orchestra; Mr. R. J. Yarworth, 252, Wellington-street, Grimsby, who says he will be happy to meet gesamideanoj visiting GRIMSBY or CLEETHORPES, and show them over the famous local docks; C. E. Cowper, U.E.A. Del., at the Pension "Silvermere," The Marina, DEAL, whole summer and autumn—at the weekly meetings of the group, and at other times and places by arrangement; F. A. Goodliffe would like to hear from any *samideano* who will be spending the first fortnight in August at Bognor, with a view to propaganda work during the stay.

UTILA PROPAGANDO.

Pli ol unu faka gazeto en la lasta tempo presigis longajn artikolojn pri Esperanto. Precipe rimarkindaj estis la jenaj:—En la misia gazeto *Morning Light* (p. 226), bonega artikolo de Pastro A. Stones; en *The Missionary Quarterly* (March, 1913), "Esperanta Rubriko" tre interese redaktita de H. A. Luyken; en *Pitman's Journal*, trafo artikolo de S-ro H. Belingbroke Mudie, ankaŭ en *Public Opinion*. Ni eltiras la jenon el la artikolo de Pastro Stones:—

AT INTERNATIONAL CONGRESSES.

"This is an age of Conferences, Congresses, International and World-Wide Movements. At all such meetings the necessity for adopting some common medium for the exchange of ideas becomes more and more paramount every

year. Many public men have felt this need most deeply, and have bitterly lamented the fact.

"There are perhaps few more wearisome experiences in public life than that of sitting through a series of meetings in which all the words of every speaker have had to be translated into two or three languages before those present were able to understand their meaning. It does appear, therefore, that an International auxiliary language is needed very badly.

"In recent years the Vegetarian Society, the International Labour Congress, the International Medical Congress, and other public bodies have passed resolutions in favour of the use of Esperanto at all their meetings. In some sectional meetings of these bodies they have begun this practice already.

"It is only a short step from the above position to make Esperanto the legal and official language for all business meetings of Congress, and for reports to be printed in one language, and thus effect a great saving in time and labour; and make for greater efficiency."

LETTER TO JAPAN.

Tre interesan leteron ni ricevis de la sekretario de la Esperantista Societo en Yokoska, Japanujo (Nakazato 59), ĉefredaktoro de la gazeto *Orienta Stelo*. Parton el ĝi ni repetas, tute tiel, kiel ĝi estas skribita. Oni konstatas, ke Esperanto skribita de Japano estas tiel same facile komprenebla, kiel skribita de Eŭropano:

"*Al Altestimata Redakcio.*—Mi legis en Rusa Esp. gazeto pri 'La Nova Testamento' eldonota en via lando, kaj nun mi permesas al mi demandi vin, ĉu ĝi jam aperis aŭ kiam ĝi aperos, kaj kie ĝi estas havebla. Bonvolu tuj respondi, ĉar mi tre volas ĝin havi kaj senpacience atendas ĝian aperon. Jes. Ĝis nun iuj sinjoroj, al kiuj ni predikas pri la jam en praktiko vivanta stato de Esperanto, moke demandis nin: ĉu oni jam havas Biblion en Esperanto? Kaj, ĉe nia nea respondo, ili aldonis: Ne plu prediku pri Esperanto, kies senvivecon jam pruvas la fakteto — la manko de l' libro plej bezonata de l' homaro! Sed en la estonteco ni povos fieri al ili montri tiaokaze 'La Novan Testamenton.' Ho! agemaj samideanoj de mia frata lando! Ni kore salutas kaj dankas vin pro la plej bona kaj efika propagando, kian via lando proponis al la tutu samideanaro!

"Laŭ via peto, kun kiu vi vin turnis al mi antaŭ kelkaj jaroj, mi promesis al vi sendadi artikolojn pri japana movado de Esperanto. Sed pro trookupiteco — (mi estas studento de l' Universitato, sur min prenante le rolon de sekretario de nia societo, administranto kaj rekaktanto de O.S. kaj ankaŭ ĝia transskribisto kaj kopi-

presisto, kiel ankaŭ gvidanto de ĉi-tiea konstanta kurso de Esp.!)—mi ne povis daŭrigi mian korespondadon al vi....

“En nia lando nia sankta afero estas ĉiam ankoraŭ ne favora. Ĉu al ni mankas esperantistoj-batalantoj? Ne! Kelkaj esp-istoj sin ofereme propagandadas kaj bataladas — tamen preskaŭ senrezulte! Mi mem eldonas nian O.S. je mia propra kosto (mi mem sola kopipresas ĝin!) kaj dissendas ĝin senpage inter niaj anoj, gvidas kursojn, pruntas senpage al societanoj ĉiujn librojn el mia propra biblioteko. Aliaj propagandistoj ankaŭ penegas ne malpli fervore ol mi. Ĉu vi ricevas gazeton nomitan ‘Oriente Azio?’ Se ne, mi sendos al vi pruvnumeron (mi ankaŭ estas helpanto de ĝi, liverante artikolojn al ĉiu ĝia numero). Malgraŭ ĉiaj kaj ĉiuj penoj, nia afero ne bone ekiras... Kial?

Facile estas ja varbi, t.e. altiri al ni multajn homojn, sed tio ankoraŭ ne suficias, ĉar malfacile estas ilin elinstrui en Esperanto! Tiu tre mirinde facila Esperanto ja *aperas* al ili monstre malfacila — sed pro tio oni ne devas kulpigi Esperanton. Tio venas de largega malsameco de la fundamentoj de l’ Eŭropa (ne sole Esperanta) kaj Japana idiomoj. Bedaŭrinde la ĝis nun aperintaj Esperantaj lernolibroj por Japanoj (ankaŭ pli bedaŭrinde ili jam ĉiuj kune kun vortaroj kaj ekzercaroj estis senreste forvenditaj kaj nun Japanoj sin trovas en vera mizerega situacio sen lernolibroj kaj vortaroj!) ne zorgis pri tiu grava punkto. Do mi intencas aperigi lernolibrojn bazitan sur la kompara studio de la Esperanta kaj japana idiomoj, per kiu, mi kredas, Japanoj povus ellerni Esperanton en la daŭro de malpli ol du jaroj. Laŭ mia sperto, tri jaroj estas bezonataj al Japanoj por akiri suficien scion de Esperanto por libere paroli kaj skribi.

“Ni batalos, spite ĉiuj malfacilaĵoj, senlace, senhalte, paſon post paſo, ĝis ni venkos finan sukceson!!!

“Kun koraj salutoj de via samideano, K. OSSAKA, Sekretario de Y.E.S., Redaktoro de O.S.”

Ni kore dankas nian Japanan samideanon por lia longa letero, kaj sendas al li kaj liaj samlandaj amikoj sincerajn bondezirojn por la fina triumfo de ilia klopoado por nia afero. En Eŭropo ni ordinare ne ploras pro tio, ke la homoj forāetas niajn librojn; ni eĉ kutimas mezuri nian sukceson per la rapideco de ilia forvendiĝo. Kuraĝu! Ankoraŭ presadu!

PRI REKLAMILOJ.

Energia kunhelpanto sendis al ni jenon, kiun ni antaŭmetas por la publika pripensado:

“Unu ideo, kiu lastatempe estis diskutita en iu komitato, meritas esti pli vaste diskonata.

Tio estas, ke la kinematografo povus bonege servi kiel reklamilo pri Esperanto, se iu el niaj samideanoj povus verki komedion en kiu Esperanto ludus rolon. Tia komedio — por altiri intereson la peco devus esti komedio kaj ne dramo serioza — devus esti tia, ke ĝi trovas ĉie tujan kaj generalan akcepton ĉe la publiko, kiu vizitadas la kinemon. Mi kredas, ke la firmo kiu la plej volonte akceptus tian pecon estus Gaumont — jam ne malinklina al Esperanto. Sed supozu, ke ne troviĝos la talento inter la Esperantistoj verki tian kineman pecon, oni kredeble povus atingi la saman celon, se oni proponus al iu el la famaj aktoroj, ke li mem aranĝu laŭ sia plaĉo kaj bontrovo tian kinemajon. Imagu nur! kiel efika estus sceno “Kiel Bunny lernas Esperanton!” Disflugu la semo de la ideo, portonta bonan rikoltion!

FOLLOW UP!

“Dum mi sidas ĉe la skribmašino, mi volus skribi al vi pri alia afereto... se vi ne estos tro rapidema, Sinjoro Redaktoro, kun via blua krajono. Ĉiam ŝajnis al mi, ke ni ne sisteme sekvas kaj daŭrigas niajn propagandajn venkojn. De tempo al tempo la Esperantista gazetaro nin sciigas pri tiu aŭ alia grava korporacio, kiu uzis Esperanton aŭ eble nur esploris pri la afero. Poste por ĉiam la gazetaro estas ‘silenta kiel la tombo’ pri tia alpreno de la lingvo. Al mi ŝajnas, ke eĉ malsukcesoj devus esti dokumentitaj, ĉar tio devus servi kiel stimulilo al pli da aktiveco aŭ al pli...da modesteco kaj takto! La vero estu dirata, eĉ se la ĉieloj defalus! Unu afero, pri kiu via legantaro interesigus, estas sci kiel eble plej baldaŭ, ĉu oni komencis instrui Esperanton en Persujo, kiel rezultato de la “ordono” de la ĉefo de la Bahajistoj, kaj, se jes, kun kia rezultato. Eble rilate al tiu ĉi demando mi estas iom tro frua kun la peto, sed, almenaŭ kiam la tempo estos matura, volu nin sciigi pri la progreso. Kun kora saluto, NOREMAC.”

IO PRIPENSINDA.

Presigante la sekventan leteron, ni neniel volas komenci politikan diskutadon, sed nur montri, ke oni povas ĉiun demandon rigardi de multaj vidpunktoj. Profitan pensekzercon ni proponas al niaj legantoj — relegi la du artikolojn, tiam la jenan leteron, kaj poste konsideri la aferon de l’ vidpunkto Esperantisma. Ĉar kvankam malbone estus, politikigi nian Esperantismon, tute utile kaj animoprofite estas, Esperantismigi nian politikon! Jen la letero, de S-ro J. Thornton, 46, Amherst-road, Bexhill-on-Sea:

Alla Redaktoro de THE BRITISH ESPERANTIST.

“Tre interesaj estas (de vaste diversaj vidpunktoj) la du priskriboj pri Belgujo, kiuj aperis en la Marta kaj Aprila numeroj de la B.E.

Kvankam klare ŝajnas, ke ili kontraŭdiras unu la alian, ĉu ne povas esti, ke ambaŭ estas pravaj? Mi ja tion pensas. Tamen ambaŭ estas ankaŭ malpravaj pro tio, ke al ili mankas unu grava konsidero. La unua verkinto rigardas el interne la staton de la Belga popolo, ĝiajn virtojn, malvirtojn, kutimojn, k.t.p. La alia de supre rigardante la staton de la lando, ĝiajn eksportadon, importadon kaj tiajn eks-terajn evidentajojn de bonstato, konkludas, ke ĉio estas bone. Ambaŭ estas, en kelka grado, pravaj — ambaŭ tamen iagrade malpravaj. Unu tute ignoras la mizeran staton de la laborista popolamaso — aliflanke la alia, kvankam vivege priskribante el interna scio pri tiu ĉi afero, tamen rilatigas ĝin al ĉia kaŭzo krom la vera!

“Car ne sole en Belgujo, sed ja en la tuta mondo, la Radiko de ĉiuj mizeroj de la plej malaltaj klasoj de la popoloj estas la malbono de Privata Landposedo, kaj al tiu temo aludas nek unu nek la alia el niaj verkintoj.

“Sed tio ĉi estas efektive fundamenta. Eĉ la grandioza laboro de nia glora Majstro ne povos efektivi kontentecon aŭ feliĉecon ĉe la vulgaruloj, se samtempe ne estos forigitaj ĉi tiu grava maljusteco.

“Kiamaniere oni povas plibone efektivigi tion, estas punkto bone diskutinda, sed neniu povas zorge tralegi la verkojn de Henry George kaj Alfred Russel Wallace ne konvinkigante, ke ĝis kiam tiu ĉi radika erarego estos elkorektita vanaj estos ĉiuj niaj penadoj por efektivigi ian veran daŭran plibonigon en la ekonomia kaj morala stato de la granda popolamaso de Belgujo, aŭ de kiu ajn alia lando.”



Some Points Relating to Esperanto Style and to the Participle.

Every language has its specialities, its points of peculiar strength, and also of weakness, and good style consists in utilising to the fullest extent the former and evading the latter. The experience of generations and the example of talented authors through the centuries have, in the natural languages, shown us how to do this, and we learn largely by imitation; but in Esperanto we have a very limited experience and few models to guide us; beyond a certain point, the drudgery of imitation can still give place to the delights of initiative and discovery. *Good style in Esperanto is still in the making, and into the crucible are being thrown the peculiarities and verbal circumlocutions of all the different languages out of which translations are being made.*

This fact does, I understand, cause non-Esperantists to predict ultimate confusion, but we who have obtained an insight into the spirit of this wonderful language believe that it possesses a character of its own, in accordance with which, and not otherwise, it will expand. In our endeavours to help on its expansion we must, then, give careful regard to its special characteristics, if we wish our work to be fruitful.

In translating into Esperanto, we should utilise the special facilities offered us in this language, just as our original, if a good stylist, has utilised the strong points of his language. Let us consider how our author would have used the Esperanto language to express most clearly and gracefully (or forcibly, as the subject required) his idea, rather than try to put down an exact verbal and grammatical equivalent of his English expressions. Thus we shall really be writing in Esperanto.

But while translating is most valuable for increasing our vocabulary and obtaining a clearer understanding of the exact meaning of words (we may think loosely, but we cannot translate loosely), one page of original writing will do more for Esperanto style than twenty pages of translation. Now, for the first time, do the potentialities of the language lie freely open before us, to pick and choose, for no original author is at our elbow to thwart our (linguistic) inspiration and urge his own intent. Now, too, do we discover that, left to ourselves, we can find a safe way round those sloughs through which we floundered, and those pitfalls into which we fell when translating.

Leaving generalities, I would like to mention the participle as worthy of thoughtful study, for the facility of expression which it affords. Surely all Esperantists have been at one time enthusiastic over the participle! But there is nothing in the language that requires greater care in its use. My advice with regard to the participle would be this: use it as often as you can do so without making the sentence heavy (which it has a tendency to do, by taking the place of a number of shorter words); but never use it without stopping to consider the question of tense. The Esperanto participle has tense. So has the English? But how often do we use it? *Seizing a sword from the hands of an attendant, the king ran his enemy through the body.* Translate that literally into Esperanto, and we have a somewhat extraordinary statement, and are forced to believe that the enemy in question somehow got himself in the way between the king and the attendant as the sword was passing from the one to the other, and lost his life through that mischance. Similarly: *Picking up a stone, the boy threw it at*

the dog, makes nonsense, translated, literally into Esperanto; and : *Hurrying home, he told the news to his wife and children,* would, so translated, in all probability be a misstatement. How is this? Because here we have an instance in which Esperanto is strong and English weak. In exact wording we should have to say : *Having seized a sword from an attendant, the king ran his enemy through the body ; Having picked up a stone, the boy threw it at the dog ; and, Having hurried home, he told the news to his wife and children.* But see how the sentence in each case loses force by the cumbersomeness of this two-word participle. The impression becomes ours, that the king was awkward in his movement ; that it was a matter of indifference to the boy whether he hit the dog or not ; and half the excitement is lost from the news that the man hurried home to tell. Is it not so? Experience has taught us to use, on such occasions, the present participle for the past ; but in Esperanto there is no need to do this, and common sense, not English usage, should be our guide in deciding the question of tense for our participles. Did the king seize the sword before he struck his enemy ? Did the boy pick up the stone before he threw it ? Did the man hurry home before he told his news ? Then it is plain that the participle must be in the past tense.

It is easy to find phrases in which the English present participle must be translated by the future, present, or past, according to the remainder of the sentence. 1. *Leaving the child at the railway station, the mother gave him careful instructions as to what he should do.* 2. *Leaving the child at the railway station, the mother looked back and nodded encouragingly to him.* 3. *Leaving the child at the railway station, the mother made several purchases in the town.* In the first sentence it is evident that the mother gave the instructions to the child before she left him, and the Esperanto participle must therefore be *lasonte* ; in the second, the mother turns and nods in the act of leaving him, and we should say *lasante* ; while in the third the mother makes her purchases after she has left the child, and the form to be used is *lasinte*.

As we have just seen, Esperanto has an advantage over English in having a future participle. The nearest approach to this in English—the form being about to, followed by the infinitive—is a makeshift which could only have been invented for use in a Latin Grammar. But the future participle in Esperanto is concise and clear, and we should learn to take advantage of it. We should not be likely to say : *Being about to commence his work, he stopped a moment to speak to me.* But that must not deter us from saying, on occasion : *Komenconte sian*

laboron, li haltis momenton por paroli al mi ; which is briefer, smoother, and more definite than : *Antaŭ ol li komencis sian laboron,* etc., which is the literal translation of what we should probably say in English.

As to the uses of the participle, it is used, as we know, as a noun, an adjective, or an adverb. Its use as an adjective is entirely familiar to us in English, and its use as an adverb is treated of very fully in most text books, but its use as a noun will perhaps bear a little further explanation, for we never put our participle to an exactly similar use. We have indeed a verb form ending in -ing, which we use as a noun, ex., *I like walking* ; but if this is a participle in form, it is an infinitive in meaning. *I like to walk* expresses precisely the same idea, and in Esperanto the infinitive *marsi* (or the noun *marsado*), but never the noun form of the participle, *marsanto*, is to be used in such a place. *Marsanto* means *walker*. The participle used as a noun never means the abstract idea of the action, but always the doer of the act, and generally the English termination -er translates the participle ending. Ex., *laboranto*, worker ; *helpanto*, helper ; *parolanto*, speaker.

But here again is something which we in English have not. Here is a noun with tense. *The speaker arose.* An extremely simple sentence, but before we can translate it into Esperanto we must know whether the person in question arose after he spoke, while he was speaking, or before he spoke, as a speaker at a meeting. In the first case, we must say *la parolinto* ; in the second, *la parolanto* ; in the third, *la parolonto*. The Esperanto participle is veritably a treasure of conciseness and expressiveness, but a pitfall for the feet of the unwary! Let all who write do something to cultivate its possibilities, but never, by careless usage, destroy its great effectiveness.

F.F.



Kiel la Urso farigis Drinkulo.

Antaŭ kelkaj jaroj mi volis pasigi mian libertempoj en Svisujo. Sed, ĉar mi estis spirite lacigita, preskaŭ eluzita per longedaŭra kaj troa cerbolaboro, mi volis eviti la enuigan vagonaran vojaĝon. Tial, mi iris vaporŝipe de Harwich ĝis Rotterdam, kie mi intencis uzi la Rejnan Nederlandan vaporŝipon por atingi Mannheim.

En ŝipiĝinte ĉe Rotterdam mi estis malagrable impresita per la ĉeesto de menaĝero de sovaĝaj bestoj, kiu okupis la antaŭan parton de la superferdeko. "Sovaĝaj bestoj! malodoraj kunvojaĝantoj! pfui!"

Sed, anstataŭ trovi la bestojn malodoraj aŭ

maloportunaj, mi pasigis tre amuzajn momentojn ĉe ili, kaj ofte babiladis kun iliaj gardistoj, strangaj migrantoj, kiuj ŝajnis scipovi ĉiujn lingvojn, kaj koni malproksimajn landojn, malofte vizitatajn de angloj.

Precipe mi paroladis kun mistera bela junulo nigrebara, kies brunan vizaĝon lumigis malhelaj okuloj brilantaj per viva inteligenteco. Li estis verŝajne cigano, kvankam li parolis sufiĉe bone la germanan lingvon.

Fumante, kuŝante sur la ferdeko, ni interparoladis pri solecaj stepoj rusaj, arbaroj Siberiaj, lupoj, ursoj, sovaĝaj bestoj kaj homoj ankoraŭ pli sovaĝaj. Li priskribis terurajn travivajojn en rusa dometo aŭ drinkejo Siberia. Post babilado kun la mistera parolema cigano, ronda danso de malpuraj longebarbaj vilaganoj, vivegaj dispuoj vesperaj en gastejoj, noktaj bataloj kun sangosuĉantaj puloj aŭ aliaj ne pri-paroleblaj bestaĉo ŝvebis* en mia spirito kiel supernatura songvidajo.

La cigano ĉiam havis, sur la genuoj aŭ ĉe la flanko, strangan kunulon, etan nigran japanan ursin. La komika besteto ludetis kun ni kiel petola katido, kaj havis la malbonan kutimon, mangeti miajn botojn.

Car la urso jam vojaĝis de kelka tempo en Germanujo, ĝi nepre eklernis la germanan biertrinkadon. Ĝi estis preskaŭ drinkulo. Ĉiumomente, iu admiranto donacis al la nigrul-

eto krucon da biero. Sed, tial ke la kruco havis kovrilon, la ursa devis ellerni la arton, malfermi la krucon per la nazo aŭ piedego.

La urso estis tiel lerta kaj drinkema, ke post nelonge ĝi eltrovis la artifikon, sufiĉe facile malfermi la krucon.

Tamen, ankoraŭ unu malhelpaĵo sin prezantis al la ursa spirito. La kruco estis nome tiel alta kaj mallarĝa, ke la besto ne povis ĉiom trinki, kauze de la formo de sia nazo.

Tiam, ridiga sceno de kolero, murmureto, laŭta murmuro, sovaĝa murmurego de ĉagreno kaj pasia deziro!

Kiel ni ridis! La nigra urseto estis por ni "komedianto malgraŭ si"; kaj ĝia komedieto sin ripetis multe da fojoj, kun mirinda sukceso teatra, kaj malsukceso biera... Unu tagon, tamen, nia ursa komedianto eltrovis novan artifikon. Ĉu hazarde, ĉu intence? mi ne scias.

Estis terure varmega, sunbrila tago, kaj Nigrulo havis eble grandan soifon, t.e., pli grandan ol ordinare. Ĉiuokaze, ĝiaj murmuregoj fariĝis preskaŭ frenezaj pro kolero; kaj fine ĝi donacis al la malbenita kruco, murr!...teruran vangobaton, tiel ke la dezireksita fluidaĵo fluis sur la ferdekon. Nigrulo estis kontentega, pro la eltrovo aŭ neatendita okazo, kaj, inter laŭta ridego kaj babilado de la ĉeestantaro, ĝi eltrinkis la bongustan-ſaumantan germanan bieron.

N.B.—Tio ĉi ne estas morala rakonto por kontraŭ-alkoholistoj aŭ bontemplanoj.

A.E.S.

* Flugpend', hover, float, *germ.* schweben.



Esperanto versus Volapük.—The Two Compared.

By H. C. EDWARDS-CARTER. (*Esperantist* 12,408).

In view of the recent death of Bishop Schleyer, the inventor of Volapük, it may be of interest to Esperantists to know something regarding the first serious attempt at a universal language. I first made the acquaintance of Volapük some 17 years ago, when I was a youngster of 15, and having an aptitude for strange tongues, gained as much proficiency in Volapük as it was possible to do.

Looking back to the time of study it took, and then comparing it with the little time necessary to acquire a working knowledge of Esperanto, it is easy to perceive that if it came to a test of the relative merits of the two languages, Volapük would not have an earthly chance.

In the following article I propose to briefly compare the main features of the two languages.

THE ALPHABET.

The Esperanto alphabet is simple; there are no fine sounds to which the ear must be trained, and the accent of a country however strong does not render it incomprehensible, and there is no sound in it that is not common to all nations. But let us take Volapük. Here all the vowels are always long, but there are varieties of stress and emphasis,

| | | |
|---|-------------|-----------------|
| a | sounding as | a in "father." |
| ä | " " | a in "pail." |
| e | " " | e in "the." |
| i | " " | i in "machine." |
| o | " " | o in "pole." |
| ö | " " | eu in "feu." |
| u | " " | oo in "too." |
| ü | " " | u in "tube." |

The consonants do not present very much difficulty, though there are one or two arbitrary sounds. Each vowel is pronounced separately, and the accent is always on the last syllable.

THE NOUN.

In Esperanto we have but two case terminations; in Volapük there are four. Let us take the word "man" (man). The plural forms with "s" always.

| | Singular. | Plural. |
|-------------------|-----------|---------|
| Nominative | Man. | Mans. |
| Genitive (of the) | Mana. | Manas. |
| Dative (to the) | Mane. | Manes. |
| Accusative | Mani. | Manis. |
| Vocative | O man. | O mans. |

Now as to genders. "Man" is masculine, "Vom" is feminine. "Son" (son) is made feminine by prefixing "of," thus of "son," daughter.

THE ADJECTIVE.

A simple comparison will explain this.

| | |
|-----------------|--------------|
| Malgranda. | Smalik. |
| Pli malgranda. | Smaliküm. |
| Plej malgranda. | Smalikün. |
| Tre malgranda. | Vemo smalik. |

The adjective always comes after the noun it qualifies.

Tio ĉi is rendered by "at," tiu ĉi by "atos," tio by "et" and tiu by "etos," which really means "it." Kiu and kio are rendered by "kim" and "kis" respectively.

THE PRONOUN.

The pronoun is decidedly interesting. It is declined in the five cases like the noun, and the plural is formed in the same manner, e.g., "ob" I, "obs" we. To make the possessive pronoun "ik" is added, thus "Son obik" my son, "son obsik," our son.

"Thou" is rendered by "ol," you being formed by the "s." "He" is rendered by "om."

THE VERB.

There is quite a variety of prefixes and affixes here. One example will do.

"Binön" to be. "Pabinöl," been.

Here is the present tense of "Binön."

| | Singular. | Plural. |
|------------|-----------|---------|
| 1st person | Binob. | Binobs. |
| 2nd " | Binol. | Binols. |
| 3rd " | Binom. | Binoms. |

The formation of the past tenses is somewhat irregular too, as for example :

Labön, to have. Elaböl, had.
Lofön, to love. Palöföl, loved.

The imperative has a formidable affix, Binolöd, be!

The past tense is formed by prefixing "ä" to the present tense "äbinob," I was, and the future takes an "o," "obinob," I shall be.

It may also be noted that no pronoun is used, the form of the verb word showing the person. The negative is formed by "no," "no binob," I am not; the question is formed by placing the word "li" in front, "li binob?" am I?

The passive is formed by the addition of the prefix "pa" to the infinitive, thus "palöfon," to be loved.

Let us compare this sentence.

"Little John gave a book to his friend's sister."

"Malgranda Johano donis libron al la fratino de sia amiko."

Here it is in Volapük.

"Jean smalik egivom buki of-blode flena okik."

A literal translation of sentence reads delightfully : "John little he gave a book to the sister of the friend his."

THE NUMBERS.

The numbers are ingeniously contrived ; they are : 1, bal ; 2, tel ; 3, kil ; 4, fol ; 5, lul ; 6, mäl ; 7, vel ; 8, jöl ; 9, zül ; 10, bals.

The teens are made up by affixing the unit word on to the ten with an "e" interposed : balsebal, 11 ; balsemal, 16.

The tens are formed by adding "s" to the unit word, thus : tels, 20 ; vels, 70. The other numbers are formed in the same manner as the teens, i.e., kilsejöl, 38.

A hundred is tum ; therefore 200 is rendered by "tel-tum."

Ordinals are formed by adding "id" to the cardinal ; 1st, balid ; 4th, folid.

Fractions are formed by adding "dil" : teldil, half ; veldil, an eighth.

Once, twice and so on are formed by adding "na" to the cardinal ; balna, telna, etc.

The days of the week are built up from the numbers by adding "üdel" ; therefore Monday is "telüdel," or second day, while Saturday is "velüdel," or seventh day.

The months of the year are made on a similar principle, but only take "ul." January is "Balul," while December becomes the formidable looking "balsetelul." It is lucky there are only twelve months to arrange for.

This then is Volapük. It was a well-meant attempt, and well thought out, but the shades of pronunciation, the arbitrary construction of the words, and heavy solid appearance of the language was against it, but as practically the real pioneer of universal languages, Esperantists should have a kind word in remembrance of poor Volapük. R.I.P. !

* * * *

Nova Projekto de Unuigo de Esperantistaj Societoj.*

Redaktita laŭ proponoj de D-ro Arnhold kaj aliaj.

Tiu projekto entenas, sen alia ŝango ol la titoloj de la Asocio kaj de la kondukanta Komitato la tekston de la artikoloj 1, 2, 3 kaj 6 ĝis 9 de la primitiva projekto de Tutmonda Unuigo de Esperantistaj Societoj enpresita en *Oficiala Gazeto*, 5-a jaro, No. 1 (45), p. 13.

Internacia Unuigo de Esperantistaj Societoj, I.U.E.S.

I.

Per tiu ĉi statuto kaj por interligi la Esperantistajn Societojn, kiuj deziras starigi interrilatojn por la plej rapida sukceso de siaj klopodoj, estas kreata Asocio nomata Internacia Unuigo de Esperantistaj Societoj, kies celo estas plifaciligi la propagandon de la Lingvo internacia Esperanto kaj plirapidigi gian enkondukon en la tutan mondron.

2.

La sidejo de tiu Societo estas la Esperantista Centra Oficejo, kiu estas komisiita por plenumi la taskon de sekretariejo.

3.

Tiu Asocio estas organizita kiel nura Federacio, kaj la aligantaj Societoj konservas sian memstarecon kaj sendependecon, nur nomante konsilantojn por reprezentantilojn en speciale kondukantaj supera komitato ĉi-poste montrata.

Ili nur kune interligas siajn fortojn kaj klopodojn por la studado de la demandoj, kiuj povas prezenti por ili komunan intereson, kaj por la sekvoj donotaj, se okazas, al la decidoj de la komitato, rezultantaj de tiuj esploroj.

4 (Nova).

Povas esti ano de la Unuigo ĉiu Grupo aŭ Societo, ĉu loka, ĉu faka, regule enskribita sur la listo de la Esperantistaj Societoj, kiuj pagas kotizon al la Centra Oficejo Esperantista por ricevi interŝanĝe la servojn kaj la oficialajn dokumentojn de tiu Oficejo.

Nur tiuj aroj de la Unuigo povas elekti Rajtigitajn Delegitojn por la kongresoj, kaj konsekvence voĉdoni en tiuj kongresoj, laŭ la regularo fiksita por tiu elektado, t.e. unu delegito por 25 elektintaj aroj pagintaj la ĉiujare fiksotan kotizon (vidu *Oficiala Gazeto*, 4-a jaro, No. 4 (37). Oktobro, 1911, p. 41).

Nur ili ankaŭ povas grupigi aŭ klopodi, laŭ bezone, por elekti la arojn de la Administra Komitato de la Centra Oficejo, laŭ la regularo antaŭe fiksita por la elektado de la aroj de la Internacia Konsilantaro, t.e.

* Vidu *Oficiala Gazeto*, 25an de Majo, 1913.

unu delegito por 1,000 elektintaj anoj aŭ ankoraŭ por ĉiu nacia Societo eĉ ne entenante tiun nombron (vidu *Oficiala Gazeto*, 4-a jaro, No. 4 (37). Oktobro, 1911, p. 143, kaj 3-a jaro, No. 4 (15), Oktobro, 1909, p. 128).

5 (NOVA).

La Unuiĝo estas kondukata de Estraro, kiu konsistas el du partoj.

La unua parto entenas la reprezentantojn de la grandaj Societoj, kiuj, en ĉiuj landoj, grupigas la Esperantistojn sub formo de Ligoj, Asocioj aŭ Federacioj.

Tiu reprezentantoj estas ĉu la Prezidantoj mem de tiuj Societoj, ĉu la Prezidantoj de iliaj Agadaj komitatoj.

La Vic-prezidantoj aŭ Sekretarioj de tiuj Asocioj aŭ komitatoj estas komisiitaj por anstataŭi tiujn reprezentantojn en okazo de foresto.

En la landoj kie ekzistas pli ol unu granda Societo de propagando, ĉiu Societo organizita sub formo de Asocio aŭ Federacio havanta anojn en la tuta lando, povos uzi tiujn rajtojn de aligo kaj reprezentado.

La dua parto de la Estraro povos enteni la saman nombronda anojn, kiel la unua. Ili nelektos la Rajtigitaj Delegitoj dum ĉiu kongreso, inter la plej taŭgaj Esperantistoj de tiuj landoj, kiuj bonvolos akcepti kandidatecon.

Tiu lastaj komitatanoj estos ĉiujare rebalotitaj sed estos reelekteblaj.

La anoj de la unua parto estos enskribitaj la unuan fojon laŭ avizo de la elektintaj Societoj kaj restas senŝange ĝis nova avizo de tiuj Societoj, kiuj devos zorgi por anstataŭi ilin, kiam bezonas.

6.

Por starigi amikajn kaj efikajn rilatojn inter la I.U.E.S. kaj la specialaj, fakaj kaj aplikaj Societoj kaj speciale kun la Universala Esperanto Asocio, ĉiu Prezidanto de aliginta Societo devos zorgi por starigi konstantan interkonsenton kun la Reprezentantoj de tiuj Societoj por la sama lando, elektante por tio la necesajn reprezentantojn.

7.

La Estraro studas la aferojn, kiujn proponis al ĝia esploro la Esperantistaj aligintaj Societoj, por intermeto de siaj Delegitoj en la Universalaj Kongresoj.

Gi ne rajtas mem alpreni decidojn, kiuj povus altrudi iajn devojn al la tuta Esperantistaro aŭ eĉ al iu aliginta Societo aŭ Grupo, kaj ĝi povas nur formuli dezirojn aŭ esprimi konsilojn.

Gi devas submeti al la decidoj de la Rajtigitaj Delegitoj ĉiun proponon, kiu povos trudi devojn al la Oficialaj Institucioj aŭ ŝangi la fiksitan kondiĉojn de financa helpo donata de la Esperantistoj al tiuj Institucioj. Nur en okazo de urĝa bezono, ĝi povos provizore formuli decidojn pri tiuj demandoj.

8.

Tiu Estraro estos speciale komisiita por internacie reprezenti, en okazo de bezono, la Esperantistojn apud la Registroj aŭ apud oficialaj Institucioj de ĉiu lando, aŭ apud la diversaj Internaciaj Asocioj, kiel ekzemple kongresoj, naciaj Ekspozicioj, k.t.p.

Gi devas zorgi por informi la aligintajn Societojn pri la aferoj, kiuj koncernas la generalan propagandon de la lingvo, kaj povas interesi tiujn Societojn.

Gi devas ankaŭ helpi, laŭ sia povo, la klopodojn de la Agadaj Komitatoj de la aligintaj Societoj de propaganda.

9.

La anoj de la Estraro starigas mem la regularon por la funkciado de la Unuiĝo.

Ili elektas ĉiujare inter si unu Prezidenton, unu vicprezidenton, unu sekretarion-kasiston kaj du aŭ tri asesorojn por la plenumado kaj solvado de la urĝaj aferoj.

Libraro kaj Gazetaro.

Karlo, rakonto en dudek ĉapitroj, originale verkita de Edmond Privat.—Tiu ĉi nova eldono de la bela verketo de S-ro E. Privat estas nun unafoje represita laŭ la originala manuskripto. Ĝin legos kun plenumo ĉiuj, kiuj amas la simplan klaran stilon en Esperanto. La aŭtoro majstre priskribas la vivon de Karlo de lia naskiĝo ĝis lia edziĝo. Ĉiu el la dudek mallongaj ĉapitroj bone taŭgas kiel legoleciono en kurso, dum la tuto formas ĉarman rakonton. Pri la stilo de la verko la jena eltrajo donos ĝustan ideon. Gi estas prenita el la ĉapitro pri "latina leciono" kie la maljuna profesoro "patro-barbulo" trovas, ke la liceanoj multe gravuris siajn nomojn, k.t.p., sur la benkoj.

"Mi opinias, ke mi devas vin ĉiujn puni," diris la profesoro... "Kvankam tiuj tabuloj estis tre malnovaj vi estas tamen ĉiuj kulpaj, tre kulpaj. Nur bubetoj kaj malsaguloj tiel amuzigas anstataŭ..." Subite li haltis paligante antaŭ la benko de Gardiol. Dum longa momento li silentis. Lia vizaĝo estis blanka. Liaj okuloj ŝajnis ligitaj al la tabulo de tiu benko. Neniu en la klaso kuraĝis movigi aŭ eĉ spiri. Liaj palpebroj videble malsekiĝis.

"Knaboj," li ekdiris per mallaŭta kaj tremanta voĉo, "tie estas gravurita la subskribo de...mia patro."

De tiu tago Karlo havis grandan amon al "patro-barbulo."—A.B.

Kie estas la Eklezio de Kristo? de M. v. d. Hagen, SJ, tradukita el la nederlanda lingvo de F-ino M. Borret (kun eklezia aprobo).—Tiu ĉi verko celas pruvi, ke la vera eklezio de Kristo troviĝas nur en la tiel nomata "Katolika" Eklezio. La aŭtoro bazas sian tezon ĉefe sur la jenaj argumentoj :—

"La vera eklezio estas unu (havas unu kapon, la papo, kaj unu doktrinon)."—"La vera eklezio estas sankta" (tie ĉi la aŭtoro rakontas pri la nesankta vivo de Lutero, k.c.)—"La vera eklezio estas Katolika, t.e. universala."—"La vera eklezio estas Apostola."

En la tria parto la aŭtoro traktas pri "kelkaj fundamentaj diferencoj inter Katolikoj kaj Protestantoj," nome "La Sankta Skribo"; "la kredo kaj la bonfaroj"; "la konfeso kaj la indulgenco"; "la purgatorio"; "la meso"; "honorado al sanktuloj," kaj "mirakloj."

La stilo de la traduko estas ĝenerale vigla kaj facile legebla. Gi donas riĉan provizon de teknikaj vortoj, rilatantaj al la temo, kiuj ofte estas bone elektitaj. Ni devas tamen aldoni, ke la libro enhavas multajn erarojn, precipe en la uzo de la radiko ebl', ekz.: "ke li estas tute neebla por pruvi" (anstataŭ—ke al li estas tute neebla pruvi), "ke la Katolika Eklezio aŭ ĝiaj superregantoj estas eblaj por (= povas) konkludi..." "La Protestantoj neebles povas pruvi..." "kiu eblas forjeti tiujn..." k.c., k.c. Ni ankaŭ rimarkis uzon de "devas" (p. 136, linio 25) anstataŭ "ſuldas" kaj multe da aliaj eraroj.

Grandan laboron faris nia samideanino tradukante tiel dikan volumon. Tamen leginte ĝin ĝisfine ni estis iom malgajigitaj de la penso—kial traduki en Esperanton verkon tian? Gi certe ne konvertos unu Protestanton al la Katolicismo. Pli bone estus laŭ nia opinio, ke niaj Katolikaj samideanoj, anstataŭ polemiki kontraŭ la "herezuloj," penu trovi komunan teron, sur kiu ambaŭ povus labori por la bono de ĝi homaro.—A.B.

Poſta Esperantisto.—(Breslau, Maxstr. 22, ĉe Supera Poſtpunktikanto Arnold Behrendt).—La Marta numero de tiu ĉi ĵurnalo, kiu estas la oficiala organo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Poſtſtacijoj, estas tre enhavoriĉa, kaj montras, ke la praktika uzado de nia lingvo disvastiĝas ĉiutage. Bonan konsilon donas la

redakcia artikolo—"devigon rilate el la scio de Esperanto por la poštadministracioj kreos la multiĝintaj anoj de nia afero kaj postuloj pri esperantistaj oficistoj okaze de internaciaj kongresoj. Kaj tiam estas la tasko de la dejorantaj oficistoj, kontentigi la bezonon de la vojaĝantaro. Kiam la poštstoficistoj rimarkos, ke pli kaj pli multaj vojaĝantoj parolas al ili Esperante, ili plifaciligos al si la ciutagan laboron elspezante malmulte da tempo, mono kaj peno por la lernado de Esperanto. Kaj male: kiam la vojaĝantoj konstatos, ke ankaŭ en la poštstoficejoj, kiujn ili ja ĉiam bezonas, oni scias Esperanton, ili estos instigataj al okupo pri la lingvo, kiu ankaŭ al ili plifacilas la vojaĝadon. Poste la administracioj konstatos, ke vere ekzistas neceseco por la ekuzo de Esperanto."

Inter la multaj interesplenaj artikoloj troviĝas "Pošt-papiruso el antaukrista epoko" kaj "Aerposto"; tiu lasta estas la dekreto de la germana ministerio por poštaj kaj telegrafaj aferoj—gi devas esti konsiderata kiel grava dokumento. *Pošta Esperantisto* meritas bonan lokon inter la internaciaj jurnaloj fakaj; do ĝiaj legantoj estu multinombraj!—SOLOM.

Los Angeles, Kalifornio.—Bele ilustrita gvidlibro pri Los Angeles, Esperante eldonita de la tiea Komerca Ĉambro. Ĉiaj informoj por la urbo kaj ĉirkaŭa regiono sin trovas sur la paĝoj de tiu ĉi libro, kiu tre interesas al la samideanoj, kiuj serĉas teran paradizon. Sub la titolo "Ne faru ĉi tion," ni legas: "ne imagu, kiam vi venas al suda Kalifornio, ke vi trovos ĉi tie parton de la kruda duonsovaĝa okcidento! Ne imagu, ke estas facile trovi okupon, per kiu oni gajnas monon sen vera laboro. Kontraŭe ĉi tiu regiono estas eble malplej taŭga urbo en Usono, proporcie al sian grandeco, por homoj, kiuj deziras sin okupi kiel komizo, librotrenistoj kaj similaj profesioj, ankaŭ por advokatoj, kuracisto, pastroj kaj fine por tiuj, kiuj deziras konduki malgrandajn butikojn—Tamen, estas ĉiam bezonataj ĉiaj metiistoj, laboristoj kaj ĉiuj viroj—kaj virinoj—kiuj povas fari ian aferon iom pli bone, ol povas aliaj."

Ni tre dankas la Los Angeles Komercan Ĉambron por tiu ĉi imitinda metodo reklami sian urbon.—SOLOM.

The Edinburgh "Vortareto."—Announcement will shortly be made of the publication by an eminent firm of publishers of international repute of a complete Esperanto-English and English-Esperanto Pocket Vortareto. The material for the Vortareto has been completed and is now undergoing final revision by a committee in Edinburgh, under the guidance of Mr. John M. Warden, L.K., F.B.E.A. A considerable part of the preliminary work was done by Mr. W. W. Mann, editor of THE BRITISH ESPERANTIST and *Esperanto Monthly*; and although the Dictionary will be small in bulk, it will be found that its contents will be sufficiently ample for the needs of the ordinary Esperantist, and the careful revision to which it is being subjected will ensure that it will be more than usually reliable. The price in Great Britain will be one shilling.



Esperanta Progreso Alilanda.

Polujo.—Pola Esperantista Societo en VARSOVIO arangis ĉiujaŭdajn prelegojn pri tre interesaj temoj. La serion de prelegoj komencis S-ro M. Czezwinski, parolante pri novaj akiroj de scienco. La prelego elvokis tre viglan diskutadon pri la temoj ektuigitaj de la preleginto. Duan prelegon diris D-ro L. Chybczynski, redaktoro de *Kuracisto*, pri Higieno; ankaŭ tiu interesa temo estis diskutata de specialistoj-kuracistoj, kiuj klarigadis ĉiujn scivolajn demandojn de la laikoj.

Triaj jaŭdon parolis S-ro K. Rybczynski, komercisto-akademiano, rakontinte al ĉeestantoj kiel Esperanto helpis al li en eksterlanda vojaĝo. Vere interesis ĉiujn la aventuroj de S-ro R, por kiu Esperanto estis ora ŝlosilo al simpatio kaj helpo de eksterlandaj samideanoj. Sekvintan jaŭdon parolis D-ro Nauman pri songoj kaj ilia signifo, laŭ lastaj pruvoj de scienco. Rimarkinde estas ke pri tiuj prelegoj varsoviaj ciutagaj gazetoj presas komunikojn. Krom tio en la Societo mardo kaj vendredo vespero de 8½ estas kondukata nova kurso de Esperanto.

Ke Esperanto lastatempe disvolviĝas en Polujo pruvas la fakteto, ke la unua eldono (1,000 ekz.) de tre bona esp.-pola vortaro de S. Czarowski estas tute elcerpita. Dua eldono de tiu utila, ĝis nun plej granda esp. pola vortaro, eldonita kiel 15a volumo de *Komerca Biblioteko* estas tute kontentige disvendata.

En Varsovia Universitato ekzistas agema esperanta grupo. Oni klopodas por oficiale malfermi studentan rondeton de esperantistoj. En studenta legejo estas troveblaj kelkaj esp. gazetoj, abonataj per kolektita mono. Krom tio Esperanto tre bone kaj konstante sin disvastigas en polaj provincurboj kiel ekzemple en PIOTRKOW en LUBLIN kaj SIEDLCE.—Sajnas al mi ke tiuj ĉi suprecititaj faktoj bone pruvas, ke eĉ en tiel surda provinco de la mondo kiel estas nia lando oni povas ankaŭ efike labori, sed nian aferon oni devas ĉiam senĉese kaj senlace propagandi, malgraŭ malforta komenco, malgraŭ malhelpon de skeptikuloj. Estonto estas nia!—VLAO POSNER.

Germanujo.—Raporti pri la 2a kvaronjaro 1913 en Germanujo rilate al Esperanto ne estas facile tasko—se oni volus citi ĉion, kio okazis kaj kion viglaj propagandistoj entreprenis por atentigi la homojn pri nia kara afero. Sed tre ĝojiga tasko estas tiu ĉi raporto, se oni—kiel mi ĝin volas fari—nur donas resumon pri ĉio ĉi kaj speciale nur citas la plej gravajn aferojn kaj la sukcesojn praktikajn. Do, ĝenerale dirite, la pasintaj monatoj estis vivplena; okazis en multaj urboj kaj loko, eĉ ofte en nekredeble malgrandaj kaj nekonataj vilaĝetoj, kunvenoj, kiuj aŭ celis atentigi la logantojn de tiuj lokoj pri nia afero la unuan fojon aŭ havis la taskon, kunigi la anojn de la ideo de internacia helplingvo pli firme, por fondi grupojn. Tiuj klopodoj en multaj okazoj havis sukceson kaj alkondukis al la Germana Esperanto-Asocio dum la monatoj Januaro ĝis Aprilo, 1913, 19 novajn grupojn. Al tiu ĉi pruvo de la varbkapableco de nia ideo aldonigas la multaj belaj sukcesoj, kiuj montriĝis dum la kunvenoj de la diversaj Ligoj, ekzemple de la Bavara Ligo en NÜRNBERG kaj ROSENHEIM, de la Nordokcidenta Ligo en HANNOVER, de la Nordalbinga Ligo en HANNOVER, de la Saksa-Turinga Ligo en HALLE kaj de la Saksa Ligo en FRANKENBERG. Ĉiuj estis en pli aŭ malpli brila kadro manifestacioj, montrantaj al la neesperantistoj la gravecon de Esperanto, kaj estantaj por la partoprenantoj nova instigo, nova esperigo por la daŭrigo de la laboro. Do oni povas esti kontenta, ke en Germanujo laŭ la modelo de la multaj ŝtatoj kaj provincoj ekzistas preskaŭ same multaj ligoj; kiel la malgrandaj ŝtatoj estas kulturcentroj tre valoraj por la nacia vivo, por nia esperanta vivo tiuj ligoj estas inspirantaj centroj ne volonte malhaveblaj. Ce la *Ligo-tagoj*—precipe ĉe tiu de la Saksa Ligo en Frankenberg—ofte montriĝis la kreskanta bonvolo kaj kompremo de la aŭtoritatoj kaj registroj rilate al Esperanto, en salutvortoj de la urbestro de Frankenberg kaj de la direktoro de la tiea Reĝa instruista seminario, Esperantista orelo kun ĝojo povis konстати esperigajn sonojn por la ne tro malproksima tempo de la oficiala apliko de Esperanto kaj por ĝia enkonduko en la lernejojn.

Ke la instruo de nia lingvo al lernejanoj tre bone estas ebla, ree pruviĝis en la en *diversaj lernejoj* je Pasko faritaj *ekzamenoj*, kiuj senescepte montris, ke la geknaboj, plejparte en la aĝo de 12 gis 14 jaroj, kun intereso kaj fervoro sekvis la instruadon kaj ke ili sufice enprofundigis en la spiriton de la lingvo. Ni esperu, ke la bonaj ekzemploj, donitaj de instruistoj ekz. en CHEMNITZ-SCHÖNAU, DEUBEN, DRESDEN, k.t.p., kaj—eĉ de ne-instruisto—in GRÖSS-SCHÖNAU, trovu sekventojn en kiel eble plej multaj lokoj. En la altlernejojn speciale eniris Esperanto en AUGSBURG, en la sama urbo ankaŭ en la "plikleriga lernejo" kurso rekomendita de la Direktoro nun komenciĝis. Tre grava ankaŭ estas la subteno, kiun donis *la magistrato de LEIPZIG* al kurso, farita inter la oficistoj. La kurso finiĝis en Aprilo kaj ekzameno estis aranĝata por la partoprenantoj en kiu 42 partoprenantoj bone sukcesis. La ĉefurbestro D-ro Dittrich ĉeestis kaj post la fino de l'ekzameno laŭdis la fervoron de instruintoj kaj lernintoj. Laŭ lia instigo tuj fondiĝis *grupo de la Leipzig'aj Magistratoficistoj*, kiu celas, plilertigi la anojn en Esperanto por la uzado de tiu ĉi lingvo en la eksterlandaj rilatoj de la magistrato, kiuj ja en la nuna tempo tre multiĝis pro la en la nuna kaj la estonta jaroj okazantaj ekspozicioj pri konstruado kaj pri librarto, k.t.p. Fortan helpon la Esperanto-movado en Leipzig ankaŭ ricevis per la translokiĝo de la *Saksa Esperanto-Instituto* de Dresden al Leipzig, kie ĝia direktoro, S-ro D-ro Schramm, nun okupas la oficon de estro en la novefondita "Deutsche Bücherei" (Germana libromuzeo). La Biblioteko de la Saksa E. Instituto nun havas la titolon "Reĝa E.-Biblioteko." Konforme al tiuj progresoj, venantaj aŭ helpataj, kiel oni diras "*dé supre*," iradas per viglaj paſoj E.-movado "*de malsupre*." El la *rondoj de laboristoj*, kiuj interesiĝis pri Esperanto, en mirinde mallonga tempo elkreskis la *Germana Laborista Esperantista Asocio*. Gi nun jam havas pli ol 60 grupojn en preskaŭ ĉiuj partoj de la imperio kaj certe staras antaŭ tre gravaj progresoj. Tion almenaŭ supozigas la pritraktoj de la Asocia tago, okazinta en FRANKFURT A. MAIN dum Pasko, kaj oni nur povas gratuli al la progresemaj laboristoj, ke ili—ja celante internaciecon—ne malaten-tis la veran internacian ligilon, la helpan lingvon, kiun akiri ili facile povas, dum la studado de naciaj fremdlingvoj por ili estas preskaŭ aŭ tute neebla.— Sed, ĉiam parolinte pri la propagando kaj la laboro, mi estas forgesinta, ke ankaŭ dum somero Samideanoj volonte kunestas festante, kompreneble ne kiel en vintro en salonoj kaj ĉambroj, sed sub blua ĉielo, en arbaro kaj kamparo, apud rivero aŭ maro. Oni ekskursas volente en la germanaj E.-grupoj, la Ligo tagoj preskaŭ ĉiam okazas en bele lokita urbo kaj la vojaĝo ofte estas ligata kun gaja migrado. Baldaŭ eksonas la granda alvoko, por la ĉefa kunveno de la Germanaj Esperantistoj, por la 8a *Germana E.-Kongreso en STUTTGART*, en la perlo de la bela Svaba lando! Profesoro Christaller ĝin preparas; kiu konas lin, tiu certe estas jam nun konvinkita, ke la kongreso estos brila sukceso kaj samtempe inda antaŭludo, enkonduko por la "9a" en Bern. Do—irante al Bern, Samideanoj britaj, ne forgesu, ke Stuttgart atendas Vin kaj ke gastama akcepto por Vi estos certa: Gis la revido en Stuttgart inter la 19a kaj 22a de Aŭgusto, 1913.— JOHANNES KARSCH, Dresden.



Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, June 16, 1913, at 6.30 p.m. Present: Colonel W. A. Gale, Dr. J. Pollen, Messrs. P. Blaise, P. J. Cameron, B. Chatterton, E. W. Eagle, H. Epstein, C. Evans,

C. A. Fairman, A. Honeysett, B. E. Long, A. Morrow, W. Phillimore, F. M. Sexton, A. Sharp, Misses D. E. Bellamy, M. L. Blake, L. S. Grant, C. M. Holmes, E. A. Lawrence, E. O'Brien. In Attendance: Messrs. W. W. Mann, E. A. Millidge, The Secretary.

Chairman.—Colonel W. A. Gale was elected chairman of the meeting.

German-British Festival.—Mr. Long made a proposal that the B.E.A. should organise a German-British Esperanto festival, which he suggested could most conveniently be held at Easter, 1914. After hearing a short explanation of Mr. Long's project, it was decided to ask him to prepare a concise written statement, and to put a definite resolution before the next Council Meeting.

August Council Meeting.—It was resolved, in view of the Congress to be held in Berne, that the Council Meeting should be held on the 11th of that month (i.e., the second Monday).

Propaganda.—Mr. Eagle stated it had been suggested to him that a kind of Esperanto League of Mercy should be formed with the special object of introducing the study of Esperanto into Sanatoria and Nursing Homes. It was decided that discussion of the matter should be referred to the next Council Meeting.

Advertising.—Mr. Epstein presented a Report from the minutes of the Advertising Committee showing the steps that had been taken during the past month, and explained the proposals which had been received. It was decided that the Committee be empowered to co-opt.

Federation of International Societies.—Miss Lawrence drew the attention of the Council to the new project for a union of Esperanto Societies appearing in the May *Oficiala Gazeto*. It was decided that the proposed Rules should be printed in the July BRITISH ESPERANTIST (p. 136), and that the matter should be brought forward for discussion at the July meeting of the Council.

Councillors.—It was reported that Mr. Epstein had been elected Delegate Councillor by the London Esperanto Club in the place of Mr. Blaise, now an Ordinary Councillor.

* * *

Minutes of Meeting of *Executive Committee*, held at the Offices of the Association after the Council Meeting on Monday, June 16, 1913. Present: Miss. D. E. Bellamy, Miss M. L. Blake, Mr. P. J. Cameron, Mr. A. Honeysett, Mr. B. E. Long, Dr. J. Pollen, Mr. F. M. Sexton. In Attendance: The Secretary.

Chairman.—Dr. Pollen was elected Chairman of the Meeting.

Constitution of Committee.—The Committee expressed the opinion that the President and the Hon. Treasurer are *ex-officio* members of the Committee, and resolved that five should constitute a quorum.

Esperanto "Key."—Mr. Long urged the necessity of producing an English "Key" to take the place of the *Cefeo* "Key," which had recently gone out of print. After a general discussion as to form and contents of the proposed "Key," the following resolution, proposed by Mr. Long, and seconded by Mr. Sexton, was carried unanimously:—

"That the British Esperanto Association forthwith issue on its own account an 'Esperanto Key,' priced at ½d., to form a regular and constant publication of the Association. The first edition to be 25,000, and reprinting to be carried out as required."

The Committee were of opinion that 24 pages without an extra cover were sufficient, and that it was desirable that the "Key" should be newly composed. It was decided that a sub-committee, consisting of Messrs. Cameron and Long, be appointed to confer with the Secretary in producing a new edition.

The British Esperanto Association (Inc.)

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

J. F. BRAZIER, Burton-road, Ashby-de-la-Zouch; P. A. BYRNE, R.I.C. Dépôt, Dublin; Miss A. DENT, 129, Green-lane, Rawmarsh, Rotherham; L. T. JONES, 85, Belvedere-road, Upper Norwood, S.E.; Prof. J. E. MCFADYEN, B.A. (Oxon.), M.A., D.D., 4, Bruce-road, Pollokshields, Glasgow; J. H. McNEILL, 109, St. Vincent-street, Glasgow; F. RAFTHER, 17, Minerva-street, Glasgow, W.; TAI SUZUKI, 66, Matsukiyacho, Asakusa, Tokio.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

L. JOHNSEN, Durban, Natal, S.A.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

Miss M. E. HAMILTON, Greenock.

NEW FELLOWS.

JAMES MACRAE, St. Leonards-on-Sea; ARTHUR DOUGLAS, Hawksburn, Vic., Australia; Rev. ARCHIBALD J. ASHLEY, Cannock, Staffs.; JAMES G. BAXTER, Walton, Liverpool.



Council Meeting, B.E.A.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, July 21st, at the Offices of the Association, 133, High Holborn, London, W.C., at 6.30 p.m.

Agenda :—Questions arising out of minutes of previous meeting (see report on p. 139).

Resolution :—That a Committee be formed to bring into existence an Esperanto Tourist Agency.

A meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.



The Examinations Committee begs to announce that on Monday, July 14, at the offices of the Association, Museum Station-buildings, High Holborn, W.C., will be held an *Examination for the Preliminary Certificate*, at 7 p.m., and on Tuesday, July 15, an *Examination for the Advanced Certificate*, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresagon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

344. Aachen (Germanujo).—S-ro Wilhelm Hoelscher, instruisto, *Benediktinerstrato*, dez. interŝangi fotografaĵojn kun fotografantoj el tuta mondo, preferas belajn pejzaĝojn, karakterizajn urbbildojn, nacikostumojn, ankaŭ stereobildojn kaj respondas ĉiam kaj tuj.

345. Auckland (Nova Zelando).—S-ro Petro Babić, *G.P.O.*, deziras interŝangi ilustr. p.kartojn kaj portretojn kun fraŭlinoj en ĉiuj landoj. (103)

346. Banff (Alberta) Kanado.—S-ro A. Bostock, *6e C. M. Walker, D.L.S.*, deziras korespondadi letere kun samideanoj en ĉiuj landoj. (103)

347. Detroit (Mich.) U.S.A.—S-ro Oscar Poehlmann, *159, Rademacher-ave.*, deziras korespondadi per vidaĵkartoj kun ĉiujlandaj geesperantistoj. Ĉiam kaj tuj respondos.

348. Detroit (Mich.) U.S.A.—S-ro F. M. Sayles, *150, Park-street*, deziras korespondadi per ilustr. poštarktoj kun alilandaj samideanoj. Ĉiam respondos. (x)

349. Sheerness (Anglujo).—S-ro Robert Banham, Gunner, R.N., *H.M.S. London*, deziras korespondi kun alilandaj samideanoj. (x)

350. Glasgow (Skotlando).—S-ro George A. MacLellan, *Glasgow Rubber Works, Maryhill*, komencanto, deziras korespondi kun alilandaj pliprogresintaj samideanoj. (x)

351. Huddersfield (Yorks.) Anglujo.—S-ro Hearly Sykes, *88, Bankfield-terrace, Lowerhouses*, deziras korespondadi kun alilandaj samideanoj. (x)

352. Honor Oak (London, S.E.) Anglujo.—S-ro Erhardo Urban, alilandulo, *7, Colyton-road*, deziras korespondi letere kun anglaj fraŭlinoj. Skribu duone angle kaj duone Esp. Mi al ĉiu baldaŭ respondos. (x)

353. Paliyagala (Ceylon).—S-ro Don Milanius deziras interŝangi il. p.kartojn, p.markojn, fotografaĵojn, k.t.p., kun anglaj, francaj kaj germanaj fraŭlinoj. Ĉiam tuj respondos.

Donations.

General.

| | |
|--------------------------------------|------------|
| Miss H. E. Boord, F.B.E.A., London | ... £0 5 0 |
| Mrs. Pennington, London | ... 0 15 0 |
| “Londona Rondiranto” | ... 0 12 6 |
| Horncastle Group | ... 0 2 0 |
| A. M. Mirrieles, London | ... 2 0 0 |
| J. E. Moran, Canada | ... 0 3 0 |
| R. E. F. Foulger, F.B.E.A., Oswestry | ... 0 4 7 |
| Edinburgh Esperanto Society | ... 1 5 0 |
| S.A.P., London | ... 1 0 0 |
| C. A. Mitchell, London | ... 0 10 0 |
| Miss Mould, Tunbridge Wells | ... 0 10 0 |
| W. Donaldson, London | ... 0 2 0 |
| Colonel W. A. Gale, Southwick | ... 1 0 0 |
| Miss G. M. Sherris, F.B.E.A., Sidcup | ... 1 1 0 |
| | £9 10 1 |

Salaries Augmentation.

| | |
|----------------------------------|------------|
| C. E. Barnes, F.B.E.A., Brackley | ... £0 8 6 |
| C. A. Fairman, F.B.E.A., London | ... 0 10 0 |
| Miss M. E. Milner, Leek | ... 0 5 0 |
| | £1 3 6 |

Advertising.

| | |
|-----------------------------------|------------|
| Miss A. Schafer, F.B.E.A., London | ... £0 5 0 |
| H. Bolingbroke Mudie, London | ... 25 0 0 |
| Anon (8686) | ... 5 0 0 |
| | £30 5 0 |

Rusaj kaj Slavaj amikoj, helpu!—Oni nin sciigas el S. Peterburgo ke S-ro V. Makuškin, eldonanto de nova ilustrita Rusa Vortaro laŭ la plano de la franca debit *Larousse*, publike promesis oferi 20% el neta profito por Esperanta propagando, kondicē ke esperantistoj iom diskonigu tiun utilan verkon. Samideanoj kiuj deziras ricevi unu aŭ multajn prospektojn pri tiu Vortaro, estas petataj sin turni al la aŭtora: *S-ro P. Stojan, B.O. 17 lin. 68, k. 25, S.-Peterburg, Ruslando*.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

354. Porto (Portugalujo).—S-ro J. A. Proença, *rua do Rosario 215*, interŝangos p.k. Metu p.m. sur la bildon. Nur kolorigitaj kaj prefere pri kostumoj.

355. London.—S-ro G. Georges, el Gebel Moya, Sudanujo, petas ke liaj gesamideanoj kaj amikoj notu lian novan adreson, nome: *Snow Hill-buildings, London, E.C.*

356. Serampore (Bengal) Hinduo.—S-ro K. Samuel, *Serampore College*, dez. korespondadi kun alilandaj samideanoj. (x)

357. Zombor (Hungarujo).—S-ro Palanacski Milivoj, bankoficisto, sciigas, ke al tiu samideano, kiu sendas al li 50–500 poštmarkojn de sia (eventuale de aliaj) lando, li sendos p.markojn de la sama valoro kaj nombro Montenegr., Bosn., Bulg., Hung., Aŭstrajn, k.t.p. La plivalorajn sendaĵojn laŭeble en rekomendita letero.

358. Glasgow (Skotlando).—S-ro Francis Rafther, *17, Minerva-street*, deziras korespondi kun fremduloj precipe Hollandoj letere aŭ poštarkte kaj interŝangi esperantajn jurnalojn. Ĉiam respondos.

359. Augsburg (Germanujo).—S-ro Fernando Kroher, *Anna-strasse, D222*, deziras korespondi kaj interŝangi poštmarkojn kun ĉiuj landanoj (sed ne kun Hungarujo, Francujo, Rusujo kaj Aŭstrio).

Wanted.—A copy or Prof. Cart's black print *First Lessons in Esperanto*, key to the three Braille volumes, published in 1904 by *Review of Reviews*.—Alfred John Adams, *Plynnlimmon-terrace, Hastings*.

Malnovaj Ekzempleroj B.E.—S-ro A. J. Adams, *Plynnlimmon-terrace, Hastings*, deziras akiri N-rojn 37 kaj 38 (Jan. kaj Feb., 1908) de la BRITISH ESPERANTIST, por kompletigi sian kolekton. Havantoj volu skribi al li.